

Niaj ĉi koncerne restantaj taskoj estas

- ekscii kiuj nocioj inter 00001 kaj 11106 havas difinon / klarigon
- traduki ĉiujn ĝis nun ne tradukitajn difinojn / klarigojn (kelkcent)
- prepari enigon de la rezulto en RailLexic por ties 4-a eldono

El tio rezultas jenaj

petoj al kunlaborantoj :

Ĉar difinoj troviĝas nur en CD-ROM-versio – do ne en libra formo, pri tasko a estas petataj kunlaborantoj, kiuj jam instalas RailLexic 3.0 de CD-ROM-disketo en sian komputilon.

Jen la procedo: Post elekto de menulingvo (angla, franca aŭ germana) aperas tabelo kun 2 maldekstraj kolumnoj "Key / Clé" (ŝlosil[numer]o) kaj "Term / Terme" (termino). Supere estas elekteblaj la fontolingvo ("Source language / Langue source / Ausgangssprache") kaj 2 celolingvoj ("Target language / Langue cible / Zielsprache"). Por serĉi difinojn elekti fontolingvon Esperanto, kaj celolingvojn angla kaj franca. Dekstraflanke malfermu la registron "Definition / Définition" (difino) ĉe ambaŭ celolingvoj. Nun kontrolu vorton post vorto, ĉu en la angla kaj/aŭ la franca celolingvo(j) aperas difinteksto. Se jes, notu la ŝlosilnumeron. En la 6-cifera numero la unuaj 5 ciferoj koncernas la nocion, la 6-a cifero indikas sinonimon, se ĝi ne estas nulo. Por ni gravas sole la unuaj 5 ciferoj. Poste anstataŭigu iun celolingvon per la germana, kaj ripetu la serĉon. Nur tiel la serĉado estas kompleta, ĉar pluraj nocioj havas difinon en nur 1 lingvo (ekzemple "akcelilo por vagonoj" (00024) sole en germana, "elektreto enveturila" (07577) sole en franca, "nadlorektrontrolilo" (02087) sole en angla). Ne necesas noti ŝlosilnumerojn ek 11107, ĉar tiuj difinoj jam estas konataj.

La kvanto de kontrolendaj nocioj fare de unu persono dependas de la nombro de pretaj kunlaborantoj laŭ jena ekzempla tabelo:

pretaj kunlaborantoj	nocioj laŭ Esperanto-komencilitero
3	a - i. j - p. r - z
4	a - f. g - l. m - t. s - z
5	a - c. f - k. l - o. p - s. ŝ - z

Pri tasko b estas petataj kunlaborantoj, kiuj sufiĉe regas anglan, francan aŭ germanan lingvon.

Pri tasko c mi mem okupiĝos. Certe la rezulto malkaŝos plurajn jam antaŭ longe elektitajn terminojn, kiuj ne respondas al la poste aldonita difino.

Do, karaj gekolegoj, bonvolu informi min ĝis fine de aŭgusto 2003, se vi pretas serĉi difinojn laŭ tasko a aŭ/kaj traduki (kiom da?) difinojn laŭ tasko b.

Amike salutas kaj anticipas dankas **Heinz Hoffmann.**

Terminara Kuriero

TeKu 120

Julio 2003

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingor

Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: esperanto@mail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: IFEF.B90GR-mei@t-online.de

Karaj geamikoj,

dum 55-a IFEF-kongreso en Dresden okazis 3 kunsidoj de Faka Komisiono. Ĉe ili partoprenis 10 sekcianoj kaj 20 gastoj. Jen pri la enhavo:



3-a eldono de RailLexic – libroforme

La hungara grupo informis, ke eblas mendi 4- kaj 6-lingvajn terminlibrojn laŭ dezirata lingvo-kombino de la 19-lingva eldono de RailLexic 3.0, se minimume 15 ekzempleroj estas aĉetataj.

Prezo de 1 libro kun 4 lingvoj: 46 €

Prezo de 1 libro kun 6 lingvoj: 63 €

Jen ankoraŭfoje la 19 lingvoj alfabeto: angla, ĉeĥa, dana, Esperanto, finna, franca, germana, hispana, hungara, itala, japana (parte), nederlanda, pola, portugala, rumana, rusa, serba, slovaka, sveda.

Letero de profesoro Erich-Dieter Krause

Komence de la kongreso la sekretario ricevis leteron de la konata leksikologo kaj aŭtoro de Esperanto-germanaj vortaroj, prof. d-ro Erich-Dieter Krause kun jena teksto:

Tre estimata kolego, mi dankas vin pro la transsendo de naŭ ekzempleroj de **TERMINARA KURIERO** de via Terminara Sekcio. Viaj TeKu estas nepre utilaj por mia leksikografia laboro, kiu ja seninterrompe daŭradas. Kiam – espereble – iam eliros dua eldono de mia *Großes Wörterbuch Esperanto – Deutsch* *, mi certe povos enmeti kelkajn nove kreitajn fakvortojn de fervojo. Estas aparte afabla de vi, ke vi tiel subtenas mian por-Esperantan laboron. Same mi alte aprezas vian agadon, antaŭ ĉio ankaŭ vian engaĝiĝon rilate la IFEF-kongreson en Dresdeno, pri kiu mi esperas, ke ĝi fariĝu sukcesa. Miaj bondeziroj al vi, kiel ĉefa organizanto, kaj al la ĉeestantoj akompanas vin.

Sincere via Erich-Dieter Kräuse

* Intertempe tiu ĉi grand-vortaro vendiĝas je reduktita prezo de nur € 19,95. Bonvolu informi pri tiu fakto la kongres-partoprenantojn.

La teksto estis laŭtlegata en kongresa kunsido.

Proponoj de IFEF-Terminara Sekcio por korektoj en PIV2

Ja estas konata sperto, ke post fino de iu ajn verko oni tamen trovas ion malĝustan, plibonigendan. En TeKu 118 troviĝas notoj pri malperfektaĵoj en la nova PIV, kaŭzigitaj parte de ni mem. La responsoj pri PIV jam komencis korekti trovitajn erarojn por la sekva eldonkvanto. Al la demando, ĉu niaj fervojfakaj korektoj estos akcepteblaj fine de majo, ili jesis. Sekve dum la kongreso ni diskutis kaj decidis korektojn de eraraj vortigoj. Jenan rezulton ricevis la PIV-kunlaboranto Claude Roux 22-an de majo:

fer/o

Ĉar la nocio **fervojo** estas ordigita sub **vojo**, sed verŝajne plej multaj legantoj serĉas ĝin sub **fero**, ni proponas ĉi tie enigi:

~**vojo**. Vd *vojo*.

klasifik³i (tr) 3

Sinonimoj en faklingvo ne estas dezirataj. Pro tio ni proponas deklari tiun vorton evitinda por la 3-a nocio:

(evi) = ranĝi.

lokomotiv/o

La movantaj fortoj nomitaj en la difino, ne estas kompletaj. Mankas gasturbino kaj aliaj esceptaj moviloj. Tute sufiĉas ne nomi la fortojn, do koncizigi la difinon al:

Surrele veturigebla traccimaŝino, servanta por translokado de vagonoj:

Solvoj de problemoj el TeKu 119

La kongresanoj konfirmis jenajn 3 terminojn:

- **“vagonkombinaĵo”** por la nocio “tutaĵo el pluraj vagonoj interligitaj tiel, ke unuopa vagono ne povas sole funkcii en trafiko”
- **“modulvagono”** por la nocio “vagono de vagonkombinaĵo”, kiu povas esti aŭ kapvagono aŭ intervagono
- **“vagonmodulo”** por la nocio “vagona sistembloko, kies plurnombro konsistigas artikan vagonon”

Pri la laboro kun UIC

Jen malĝojiga informo: La terminologia laboro ĉe Internacia Fervojunio UIC – do ankaŭ nia kunlaboro kun UIC – stagnas. La responsulino sinjorino Hoppe informis pri ĉi tiu:

- La grupa laboro de interesatoj el pluraj landoj por klarigi kaj sistemigi nociojn pri fervojaj veturiloj kvazaŭ fiaskis, ĉar mankas kompetentaj fakuloj, la grupo ne havas decidorajton, kaj la komenca interesiĝo malfortiĝis.
- Ebla solvo estus transdoni la taskojn al responsuloj pri la direktivoj de UIC. Sed nuntempe aliaj taskoj havas prioritaton.
- La ĝis nun ellaboritaj sencoplenaj difinoj estos enigataj en la datumbankon, do aperos en ĝia 4-a eldono.

Tamen, Terminara Sekcio ne iĝas senlabora. En la datumbankon centoj da difinoj atendas tradukon en aliajn lingvojn, ankaŭ en Esperanton. Pri tio jen sekva artikolo:

Difinoj en RailLexic

Laŭ la historio de Ĝenerala Leksikono de Fervojaj Terminoj (LG I - IV) kaj poste de la datumbankon RailLexic, la nocioj 00001 - 11106 estis enigataj sen difinoj. Nur tre malgranda parto de ili ricevis difinon poste. La nocioj 11107 - 12689 estis enigataj pleje dekomence kun difinoj en angla, franca kaj germana lingvoj. La koncernaj listoj troviĝas ĉe mi. En kadro de Esperanto-terminelekto inter 1996 kaj 1999 ni tradukis kelkcent difinoj. Ankaŭ tiuj troviĝas sole ĉe mi. Estas notinde, ke ĉiuj “difinoj” venis el iu fonto, pleje sen nokia sistemigo laŭ ISO-principo, sekve multfoje havas karakteron de nura klarigo.

*Grave estas,
ke ni scias,
kie troviĝas,
kion ni ne scias.*



magnet/o

Ĉar la nocio **magnetvojo** estas ordigita sub **vojo**, sed verŝajne plej multaj legantoj serĉas ĝin sub **magneto**, ni proponas ĉi tie enigi:

~**vojo**. Vd *vojo*.

metro/o

Sinonimoj en faklingvo ne estas dezirataj. Pro tio ni proponas eligi la noton SIN. metropoliteno post la difino.

metropoliten/o

La vorto estas nove enigita en PIV2 – ne fare de nia terminara sekcio, verŝajne ĉar ĝi aperis en iu literaturo. Tamen pro ne dezirata sinonimo, kaj pro preskaŭa malapero en lingvouzo, ni proponas deklari ĝin arkaismo:

(ark.) = metroo.

pram/o

Ni ne kontentas pri eligo de la nocio **pramŝipo**. Necesas diferencigi inter simpla pramo sur rivero kaj pramŝipo sur maro – kiel en PIV1. En pluraj naciaj lingvoj ambaŭ nocioj havas tute alian vorton. En difino, la adjektivo *granda malĝustas*, ĉar ekzistas kaj grandaj kaj malgrandaj veturiloj. Pro tio ni proponas jenon:

pram/o. Platboato por transporti homojn, bestojn aŭ veturilojn de unu bordo de rivero ĝis la alia:

~**ŝipo.** Ŝipo por transveturigi homojn, aŭtojn, vagonojn aŭ aliajn veturilojn.

pulman/o

La vorto restis en PIV, verŝajne ĉar ĝi aperis en iu literaturo. Tamen pro preskaŭa malapero en lingvouzo, ni proponas deklari ĝin arkaismo kun jena klarigo:

(ark.) Luksa pasaĝervagono laŭ koncepto de G. M. Pullman.

La koncepto de G. M. Pullman ne havis tiel grandan signifon, kiel la invento de R. Diesel, kun speciala Esperanto-vorto **dizelo**.

trajn^o 2

En la difino ni misuzis la vorton *unu*. Per la esprimo *alia trakveturilunu* ni volis nomi ĉefe soloveturilon (lokomotivo, drezino, veturebla traklabormaŝino ktp), sed ankaŭ aron da tiaj kunkuplitaj veturiloj. Ni proponas anstataŭigi la vorton *trakveturilunu* per la vorto *trakveturil(ar)o*. Se parenteza formo ne troviĝu en PIV, ni konsentas pri *trakveturilo*.

trajn⁸o**sub~o.** Metroo.

Ni petas tute eligi tiun vortkunmeton pro jenaj kialoj:

1. Metroo estas kompleta transportsistemo el relvojoj, instalaĵoj, veturiloj ktp, do ne esprimebla per nura "trajno".
2. Por la termino metroo ne estas dezirata sinonimo.
3. La vorton subtrajno oni ĉefe komprenas kiel trajnon dependantan de alia, de subnormala nivelo, apenaŭ kiel subteran trajnon.

trak/o**sak~o**

La vortkunmeto estas nove enigita en PIV2 – ne fare de nia terminara sekcio. Ties difino Senelira trako ne estas sufiĉe faka. Ni proponas ŝanĝon al:

Trako ligita nur unuflanke kun alia trako.

trakci/o

En la difino ni misuzis la vorton unuo . Per la esprimo manovradunuo ni volis nomi manovrantan soloveturilon aŭ aron da kunkuplitaj veturiloj. Ni proponas anstataŭigi la vorton manovradunuo per la vorto manovrokompletoj .

vagon/o**~aro**

En la difino ni misuzis la vorton Unuo . Per tiu esprimo ni volis nomi vagonon aŭ aron da kunkuplitaj vagonoj. Ni proponas anstataŭigi la vorton Unuo per la vorto Kompleto .

vagon/o**kuŝ~o, lit~o**

Anstataŭ la komuna nocio de ambaŭ terminoj, ni proponas disigon al du nocioj:

kuŝ~o. Pasaĝervagono ekipita per modestaj sid-kuŝ-lokoj.

lit~o. Pasaĝervagono ekipita per litoj.

vagon/o**restoraci~o, salon~o**

Anstataŭ la komuna nocio de ambaŭ terminoj, ni proponas disigon al du nocioj:

restoraci~o. Pasaĝervagono ekipita simile al restoracio.

salon~o. Pasaĝervagono ekipita per speciala komforto.